

Pierre Louÿs



La Rozo —  
Supernatura

NEELDONITA FABELO




Groupe Espérantiste de Paris

10, PLACE DE LA BOURSE, 10

—  
1902

701870 - B





## LA ROSE SURNATURELLE

(CONTE INÉDIT)

C'est un vieux conte. Il est d'Allemagne ; il est de France ; il est d'Arabie aussi. Voici ma façon de l'entendre. Vous en penserez ce qu'il vous plaira.


Un paysan, dans un petit village, s'habillait un dimanche pour aller à la foire. Lorsqu'il eut mis son chapeau neuf et sa blouse des jours de fête, il fut dire à ses deux filles qu'il partait pour la grand'ville. Que fallait-il leur rapporter ?

La première, qui était coquette et qui n'avait pas sujet de l'être, demanda une robe de soie. La cadette n'ayant pas besoin d'atours, parce qu'elle était plus jolie que son aînée, pria simplement son père de cueillir pour elle une rose, seul présent dont elle eût envie.

Le père acheta la robe de soie ; mais sur toute la place du marché il ne put trouver la rose. Les fleurs des environs avaient été cueillies pour la fête précédente, et elles étaient mortes fanées : il n'en restait plus une à vendre.

Désolé, sur la route du soir, s'en revint le paysan.





## LA ROZO SUPERNATURA

(NEELDONITA FABELO)

---


Tio ĉi estas antikva fabelo. Germana, franca, eĉ araba ĝi estas. Jen mia maniero kompreni ĝin. Pri tio vi juĝos laŭ via plaĉo.

Kamparano, en vilaĝeto, dimanĉe sin vestis por iri foiron. Surmetinte sian novan ĉapelon kaj sian festan kitelon, li diris al siaj du filinoj, ke li foriras al la grandurbo. Kion li devas al ili alporti ?


La unua, kiu estis koketa kvankam sen rajto, petis silkan robon. La pli juna, ne bezonante ornamajon, tial ke ŝi estis pli bela ol sia fratino, nur petis de la patro, ke li deŝiru por ŝi rozon, solan donacon, kiun ŝi deziris.

La patro aĉetis la silkan robon ; sed sur la tuta placo de l'vendejo, li ne povis trovi la rozon. La floroj de l'ĉirkaŭaĵo estis deŝiritaj por la festo antaŭa, kaj ili estis velkintaj : ne unu sola restis vendebla.

Malĝojega, dum la vojiro vespera, revenis la kam-







Il était honteux de penser qu'il allait rentrer sous son toit, une main pleine et l'autre vide. Sa première fille serait comblée, elle qui avait demandé trop; et la seconde n'aurait rien du tout, elle qui avait demandé si peu.

Comme il s'attristait ainsi le long des champs et des vergers, tout à coup une rose splendide lui apparut sur sa tige.

Elle était là, au bord de la route. Elle n'appartenait à personne. Il essaya de la cueillir, et, surpris, il n'y parvint pas. Son couteau à la main, il tenta de la couper, sans y réussir davantage.


Alors, le rosier se mit à frémir et il en sortit une voix qui disait : Jardinier, tu ne prendras ma fleur que si tu me promets de m'envoyer demain celle à qui tu la donneras, car il est de mon gré qu'elle me dise merci.

Le paysan, plus ébahi qu'alarmé, promit, et put cueillir en échange la Rose. Rentré dans sa maison, il n'eut garde d'oublier ce que lui avait dit l'arbuste, et, dès le lendemain matin, la jeune fille s'en alla seule chercher le rosier sur la route.

Elle s'avança donc vers lui et fit un gentil salut. Mais, sitôt qu'elle eût touché de la main la longue tige d'où la rose avait été cueillie, tous les autres rameaux vert sombre se mirent à croître subitement et l'entourèrent d'un filet épineux.

Elle n'essaya même pas de lutter, tant les épines





parano. Li hontis pensante, ke li reeniros hejmen, kun unu mano plena kaj la alia malplena. La unua filino estos senmezure kontentigita, ŝi kiu petis tro multe; kaj la dua nenion havos, ŝi kiu petis tiel malmulte.

Dum li malĝojis tiamaniere laŭlonge de l'kampoj kaj fruktejoj, subite rozo belega aperis antaŭ li sur sia trunketo.


Tie ĝi estis, sur la bordo de l'vojo. Al neniu ĝi apartenis. Li provis deŝiri ĝin kaj, surprizata, li ne povis. Kun tranĉilo en la mano li penis ĝin tranĉi, sen pli granda sukceso.

Tiam la rozujo skuiĝetis kaj el ĝi eliris voĉo diranta : Ĝardenisto, vi prenos mian floron, nur se vi promesos sendi al mi la virinon, al kiu vi donos ĝin, ĉar mia volo estas, ke ŝi danku al mi.


La kamparano, pli surprizita ol timigita, promesis, kaj dank'al tio povis deŝiri la Rozon. Reveninte hejmen li neniel forgesis, kion al li estis dirinta l'arbeto, kaj, tuj de la mateno sekvanta, la junulino sola foriris por serĉi la rozujon sur la vojo.

Ŝi do aliris al ĝi kaj ĝentile salutis. Sed tuj kiam ŝi ektuŝis per la mano la longan trunketon, de kiu la rozo estis deŝirita, ĉiuj aliaj malpale verdaj branĉetoj ekkreskis subite kaj ĉirkaŭis ŝin per dornhava reto.

Ŝi eĉ ne penis kontraŭbatali, tiom la dornoj estis








étaient terribles ! Elle mit ses deux mains devant ses yeux, et tomba sur les genoux, à terre.

« Cruelle enfant, lui dit le rosier, tu ne t'es pas contentée de choisir, comme ta sœur, un présent qui ne fit de mal à personne. Une rose est un être vivant. Tu le savais : pourquoi l'as-tu tuée ? Notre sève coule en nous comme le sang des hommes. Tu le savais : pourquoi l'as-tu fais répandre ? Dis adieu, désormais, à ta forme humaine, car je vais te reprendre en moi comme une autre fleur toute semblable, en échange de la première que m'avait donnée le printemps. »


Disant cela, il serra davantage encore ses rameaux hérissés d'épines, comme s'il voulait broyer la jeune fille et la faire disparaître en lui ; mais elle, bien loin de se plaindre, et touchée de repentir, ne songea qu'à la blessure de celui qui la rompait vive. Au milieu de ses angoisses, elle trouva la suprême énergie de se hausser jusqu'à la tige tranchée, où elle posa ses lèvres closes, avec sa pitié, son remords, son pardon.

Et à l'instant une fleur nouvelle s'épanouit devant sa bouche. Les épines s'écartèrent, l'arbuste redevint ce qu'il était la veille, et la jeune fille resta saine et sauve, ayant vu fleurir devant son baiser tout ce qu'elle avait de beau et de bon dans l'âme.

PIERRE LOUÏS.








teruraj! Ŝi metis la du manojn antaŭ siajn okulojn, kaj falis teren surgenue.

« Infanino kruela, diris al ŝi la rozujo; vi ne kontentiĝis elektante, kiel via fratino, donacon kiu dolorus neniun. Rozo estas ekzistaĵo vivanta. Tion vi sciis: kial vi mortigis ĝin? Nia suko fluadas en ni kiel la sango de l'homoj. Tion vi sciis: kial vi ĝin elverŝigis? Diru de nun adiaŭ al via formo homa, ĉar tuj mi vin ekprenos en min kiel alian floron tute similan, interŝanĝe pro la unua, kiun al mi estis doninta la printempo. »


Tion dirante, ĝi premis pli forte siajn branĉetojn dornoplenajn, kvazaŭ ĝi volus pisti la junulinon kaj ŝin malaperigi en sin; sed ŝi anstataŭ plendi, kaj tuŝita de pento pensis nur pri la vundo de tiu, kiu ŝin pistis vivan. Inter siaj teruroj, ŝi havis la lastan energion altigi sin ĝis la trunketo tranĉita, kien ŝi metis siajn lipojn fermitajn kun sia kompatato, sia konscienciproĉo, sia pardono.

Kaj tuj floro nova malfermiĝis antaŭ ŝia buŝo. La dornoj foriĝis, l'arbeto refariĝis tia, kia ĝi estis en l'antaŭtago, kaj la junulino restis sana kaj savita, vidinte flori antaŭ ŝia kiso ĉion, kion ŝi havis belan kaj bonan en sia animo.

PIERRE LOUÿS.







PARIS — IMP. L. POCHY